

Antaŭenigu Esperanton en la Eŭropa Unio

Apogu la kampanjon de UEA/EEU!

Kial kaj kiel? Kompletaj informoj pri la kampanjo de la Komisiono por eŭropa agado de UEA kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) troviĝas en la **UEA-vikipaĝo** <https://mallonge.net/uea-eeu>. Jen konciza resumo.

La Eŭropa Unio (EU) konferencas ĝis marto 2022 kaj ellaboras gvidliniojn por plia evoluo. Kadre de la konferenco la civitanaro estas invitata proponi kaj diskuti ideojn. Ankaŭ lingvopolitikaj demandoj rilate al la lingva reĝimo de EU (komuna lingvo, lingva egalrajteco, instruado de lingvoj en lernejoj ktp.) estas debatataj, kaj EU-civitanoj eblas voĉdoni.

Gravas via voĉo en la UEA/EEU-kampanjo!

- **The EU needs improved language learning**
(EU bezonas plibonigitan lingvolernadon)

UEA/EEU petas vin voĉdoni por tiu propono, kiu estas aparte apoginda. Ĝi pledas por grandskala apliko de la programo „Multlingva Akcelilo“ en lernejoj, kiu utiligas la propedeŭtikan efikon de Esperanto-instruado.

<https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893>
(aŭ <https://mallonge.net/propono>)

Kompleta listo de por-esperantaj proponoj troviĝas en la UEA-vikipaĝo.

Registriĝo necesas

Por apogi por-esperantajn proponojn necesas registriĝi. Sekvu la paŝojn priskribitajn en la dua paĝo de ĉi tiu informilo. Se vi bezonas helpon, skribu al **EU-kampanjo@gmx.eu**

Ĉu vi emas kunlabori en la kampanjo?

Se vi deziras ne nur voĉdoni, sed plie kunlabori, bv. aliĝi al la diskutlisto <https://groups.io/g/EU-estonteco-konferenco>.



<https://mallonge.net/uea-eeu>

EU-kampanjo@gmx.eu
Apogu – v5.1.pdf
2021-08-14

Registriĝo

Por apogi por-esperantajn proponojn necesas registriĝi. Jen konciza priskribo.

Je via unua aliro al la retejo de la civitana platformo <https://futureu.europa.eu>:

- elektu vian lingvon el la 24 oficialaj lingvoj de EU
(*ne, bedaŭrinde Esperanto ne jam estas inter ili*)
- alklaku la ligilon „Ensaluti“ dekstre de la eŭropunia flago
- en la paĝo de „EU Login“ alklaku „**Krei novan uzantkonton**“
- plenigu ĉiujn kampojn, inkluzive la „kodon“: necesas entajpi la signojn (literojn kaj ciferojn) afiŝitajn en la kaptila bildo („captcha“).

Se tio malfacile legeblas, alklaku la trilateralan sagon > supra la bildo (sub „entajpu la kodon“): sintetika voĉo laŭtlegas (en la lingvo, kiun vi elektis) la afiŝitan kodon. Aŭ alklaku la duoblan, kurbitan sagon por afiŝi novan kaptilan bildon, espereble pli bone distingeblan.

Foje pluraj provoj estas necesaj, ne malkuraĝiĝu!

Atento: **uskleco gravas** je la kodo.

- Laste, alklaku la plej malsupran kampon „Krei novan uzantkonton“.

Vi ricevos mesaĝon al la retpoŝtadreso, kiun vi ĵus registris. Atendu tiun mesaĝon kaj alklaku la ligilon en ĝi.

Vi nun devas elekti vian pasvorton. Atentu pri la kondiĉoj, kiujn la pasvorto nepre plenumu: longeco almenaŭ 10 signoj, kaj ĝi devas ankaŭ plenumi almenaŭ tri el kvar afiŝitaj kondiĉoj.

Je via unua eniro vi vidos demandaron. Vi **ne devas respondi** la demandojn, simple alklaku, ke vi ne deziras respondi ilin. Aŭ respondu nur kelkajn, laŭ via deziro.

Kaze de teknikaj problemoj skribu al **EU-kampanjo@gmx.eu**

